

La Ondo de Esperanto

Internacia sendependa magazino en Esperanto. 2018. N°7



Internacia sendependa magazino en Esperanto. 2018. №7 (285)

Ekde 2017 *La Ondo de Esperanto* aperas nur elektronike, kiel bitgazeto laŭ la normoj “pdf” kaj “ePub”.

Aperas ĉiumonate, krom aŭgusto. Senpaga literatura suplemento jarfine.

Fondita en 1909 de Aleksandr Saĥarov. Refondita en 1991.

Eldonas kaj administras: Halina Gorecka

Redaktas: Aleksander Korĵenkov

Konstantaj kunlaborantoj: Peter Baláž, István Ertl, Paweł Fischer-Kotowski, Irina Gonĉarova, Dafydd ab Iago, Wolfgang Kirschstein, Aleksej Korĵenkov, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Paŭlo Moĵajevo, Sergio Pokrovskij

Poŝta adreso: RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

Retpoŝtaj adresoj: sezonoj@kanet.ru, sezonoj@yahoo.com

Retejoj: <http://esperanto-ondo.ru>, <http://sezonoj.ru>

Perantoj. Vidu la liston sur p. 61-62.

Abontarifo por 2018

Internacia eŭra tarifo: 15 eŭroj

Internacia dolara tarifo: 17 usonaj dolaroj

Pollando: 60 zlotoj

Ruslando kaj Belarusio: 750 ruslandaj rubloj

Anonctarifo

Plena paĝo: 50 eŭroj (3000 ruslandaj rubloj)

Duona paĝo: 30 eŭroj (1800 rubloj)

Kvarona paĝo: 15 eŭroj (900 rubloj)

Okona paĝo: 10 eŭroj (600 rubloj)

Kovrilpaĝa anonco kostas duoble. Triona rabato pro ripeto.

Donacoj: La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia UEA-konto «avko-u» ĉe UEA.

Recenzoj: Bonvolu sendi du ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k. a. al la redakcia adreso.

Represo: Oni povas represi tekstojn kaj bildojn nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2018, №7 (285).

Ежемесячный журнал на языке эсперанто.

Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ №77-9723.

Учредитель и издатель: Горецкая Г. Р. Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 2 июля 2018 г.

Bazaj informoj pri <i>La Ondo de Esperanto</i>	2
En ĉi tiu numero	3
Temo	5
Peter Baláž. La plej granda renkontiĝo de plurlingvemuloj	6
Eventoj	8
Wiesław Libner. Jubilea fervojista kongreso	9
Rudof Fischer. Esperanto dum la Katolikaj Tagoj en Münster	11
Lu Wunsch-Rolshoven. Trilanda kongreso en Zweibrücken	12
Ronald Schindler. La deka Ponta Festo ĉe Odro	13
Peter Wraae. La dua skandinavia kongreso, cent jarojn post la unua	15
Vilĉjo Walker. Skota Kongreso en Perth	16
Piet Glorieux. FEL feste malfermis sian novan sidejon	17
Anton Mihelič. La 20an fojon en Alp-Adrio	19
Anĵela Belenko. Esperanto en Jalto plu vivas	20
Vytautas Šilas. Ĵurnalistaj sunradioj super Aukštadvaris	21
Simpozio pri multlingvismo ĉe UN	23
Zhao Wenqi. Ĉinio: Seminario pri lerneja Esperanto-instruado	24
Irina Gonĉarova, Aleksandr Basov. KER-Ekzameno en Moskvo	25
Peter Baláž. Ekspozicio pri Esperanto kaj Zamenhof en sinagogo	26
Prestiĝa elekto por UEA ĉe UN	27
Mireille Grosjean. La Premio Mauro La Torre	27
Kajlo Bailey. Esperanta Printempo en Norda Karolino	28
Marian Vochin. Rumanio: Publika legado	28
Jouko Lindstedt. Harri Laine jubileas	29
Esperanto-somero en kastelo	30
La red. Radio Esperanto: ĉiuj programoj en unu retejo	30
Esperanto kaj universitato: Nitobe-simpozio en Lisbono	31
Nekrologe	32
Koncize (11 informoj)	33
Tribuno	34
UEA pri la Monda Tago por Kultura Diverseco	35
UEA alvokas okaze de la Monda Tago de Rifuĝintoj	36
La Estraro planas altigi la kotizojn kaj likvidi la Jarlibron	37
Giorgio Silfer. Kial UEA mortos nek post kvin nek post dek jaroj	38
Romualda Jeziorowska. Fotokonkurso de PEJ	39

Arkivo	40
Aleksander Korĵenkov. Jubileoj kaj memordatoj en julio 2018.	41
Kulturo	42
Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. Aperis la portugala versio de la Zamenhofa biografio	43
Vytautas Šilas. Zamenhofoj en Varsovio (Recenzo: Roman Dobrzyński. <i>Zamenhof en Varsovio</i>)	44
Sten Johansson. Averta pri murdo (Recenzo: Julian Modest. <i>Averta pri murdo</i>)	47
Ricevitaj gazetoj	48
<i>Literatura Foiro</i> №292 fokuse al tradukarto	49
Prezento en Budapeŝto.	49
Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. Bibliografio de Aleksander Korĵenkov (3)	50
Mozaiko	59
István Ertl. Spritaj splitoj kaj preskeraroj.	60
Kiel aboni <i>La Ondon</i>	61

Lýdia Machová kaj Peter Baláž estis la ĉeforganizantoj de la kvina Plurlingvula Kunveno, kiu estas unu el la plej gravaj servoj, kiujn la esperantistoj faras por la ekstera mondo. (Foto: Jozef Baláž)

Ni en la reto:

La Ondo de Esperanto: <http://esperanto-ondo.ru/Ind-ondo.htm>

Abono 2018: <http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Elŝuteblaj libroj: <http://esperanto-ondo.ru/Libroj/Libroj.php>

Novaĵretejo La Balta Ondo: <http://sezonoj.ru/>

Radio Esperanto: <http://radio.esperanto-ondo.ru/>

Halina en FB: <https://www.facebook.com/halina.gorecka.3>

Aleksander en LJ (ruse): <http://sezonoj.livejournal.com/>

Ruslingva informretejo: <http://rusa.esperanto-ondo.ru/>

Temo



Peter Baláž, kunordiganto de E@I kaj organizanto de diversaj Esperanto-eventoj, pruvas, ke oni povas allogi homojn al Esperanto per diversaj, ne ĉiam rekte propagandaj, manieroj. (Foto: Jozef Baláž).



La plej granda renkontiĝo de plurlingvemuloj

Rekorde multaj 538 plurlingvemuloj el 56 landoj ĉeestis de la 30a de majo ĝis la 3a de junio la plej grandan renkontiĝon de poliglotoj “Polyglot Gathering” (Plurlingvula kunveno, <https://www.polyglotbratislava.com/>) en la Ekonomia Universitato de Bratislavo. Je la kvina jaro de la evento venis eĉ je 80 homoj pli multe ol dum la pasinta kunveno, kiu okazis samloke en 2017. La eventon ĉeforganizis E@I, helpe de pluraj kunorganizantoj kaj volontuloj.

Ĉi riu renkontiĝo ne celas esperantistojn, nek estas celo iel tro puŝi en ĝi Esperanton. Ĝi estas por ĉiu plurlingvemulo, sendepende de tio, kiajn/kiujn lingvojn tiu aŭ alia parolas kaj kiomgrade. Tamen estas ege interesa rilato de Esperanto en la tuto: unue, ĝin elpensis kaj la tri unuajn fojojn organizis tri esperantistoj en Berlino: Judith Meyer, Chuck Smith kaj Martin Sawitzki. En 2017 transprenis la organizadon E@I, kune kun la slovaka poliglotino Lýdia Machová. Rezulte: ĉirkaŭ kvarono de la patrorenantoj nun scipovas Esperanton. Ne hazarde pluraj programeroj devenas rekte el la Esperanto-kulturo. Eble ankaŭ pro tio eĉ neesperantistoj bone sentas sin dum la evento – la Esperanta etoso penetras en ilin, eĉ se ili mem la lingvon (ankoraŭ) ne parolas. Multaj venintoj ekhavas ĉi tie la unuan eblon praktiki Esperanton, aŭ eĉ entute ekscias pri la lingvo kaj tuj vidas, kiom ĝi praktike uzeblas – ja preskaŭ la tuta organiza teamo uzas ĝin kiel laborlingvon! Eĉ se la angla estas la ĉefa lingvo de la evento, Esperanton eblus titoli kiel la dua lingvo kaj ĉefe “la unua organiza lingvo”.

Gravis ankaŭ la financa subteno: la eventon sponsoris pluraj lingvo-rilataj kompanioj (kutime komercaj firmaoj, eldonejoj), sed ankaŭ UEA kaj EAB (Britio); danke al tiuj unu salono – tiu por kulturaj programeroj – portis la nomon “Esperanto”, kaj la lingvo estis bone videbla sur diversaj afiŝoj kaj informiloj. Plia subtenanto estas la aplikaĵo “Amikumu”, kies du kreintoj eĉ fondis la eventon mem. La organizadon helpis ankaŭ la financa subteno de la Eŭropa Unio – nome la EVS-programo de Erasmus+. Danke al tiu haveblis kvar EVS-volontuloj en E@I, kiuj ege kontribuis por la sukceso de la renkontiĝo.

La aranĝo komenciĝis merkrede per la registriĝo, sekvis kelkaj poliglota lingvaj ludoj kaj finiĝis per solena malfermo vespere. Sekvis kvar tagoj plenaj de prelegoj, metiejoj, praktikaj lingvo-lecionoj kaj kultura programo – entute 95 programeroj. Ne mankis partoj, rekte prenitaj de la Esperanto-eventoj: gufujo, aligatorejo, kulinara festivalo, Internacia vespero, plurlingva koncerto de Jonny M.

La poliglota komunumo nur nun komencas aktive formiĝi kaj pli regule renkontiĝadi. Nun ekzistas tri grandaj plurlingvaj eventoj: LangFest en Montrealo, Polyglot Conference (ĉiujare en alia lando) kaj Polyglot Gathering. Denove amuza fakto: en la organizado de ĉiuj ili estas envolvitaj esperantistoj! Kaj Polyglot Gathering iĝis la plej granda ĉi-speca evento kvazaŭ “UK de la poliglota komunumo”. Venontjare eblos antaŭvidi partoprenon de pli ol 600 poliglotoj. Ĝi eble denove okazos en Bratislavo, sed eble oni trovos lokon en alia mezeŭropa lando.

Pri la evento bone informis slovakaj amaskomunikiloj sed ankaŭ vaste pri ĝi informas sociaj retoj, blogoj, kaj la partoprenintoj mem. Jen la paĝo kun ligoj al artikoloj kaj fotaroj: <https://www.polyglotbratislava.com/after-the-gathering/>

Nun la kerna organiza teamo vikle pretigas la baldaŭan SES en Liptovský Mikuláš en Slovakio (kiu ŝajne ankaŭ iĝos unu el la plej grandaj ĝis nun – aliĝis jam 235 personoj). Detaloj pri ĝi: <https://ses.ikso.net>. Sed la E@I skipo ankaŭ diligente pretigas la unuan slovakian internacian lingvan festivalon “LingvaFest’2018” (<http://www.lingvafest.sk/eo/>), kiu okazos la 28-29an de septembro en la sama Ekonomia Universitato. Kaj la 18-21an de oktobro atendos siajn partoprenontojn KAEST (<https://kaest2018.ikso.net/>) – Konferenco pri Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko kun sia ĉeftemo “Evoluo de paradigmoj en scienco kaj tekniko”.

La event-organiza laboro en E@I bone progresas kaj alportas multaj frunktojn. Espereble tiel estos ankaŭ estonte. Ideoj por novaj projektoj kaj aranĝoj ne mankas!

Peter Baláž

E@I-kunordiganto, PG-ĉeforganizanto

Organizantoj kaj volontuloj fine de la 5a PG: pli ol duono estas esperantistoj (Foto: Jozef Baláž)



Eventoj



Oficiala Eŭrop-Unia lingvoekzameno laŭ KER estas serioza afero, sed sciante bone la Internacian Lingvon, kiel Tatjana Dubinina el Saransko, oni povas sentime kaj ridetante fronti la Esperanto-ekzamenon. (Foto: Irina Gonĉarova)

Jubilea fervojista kongreso

Dek jarojn post la kongreso en Poznano, Pola Esperantista Fervojista Asocio (PEFA) kun la Silezia Esperanto-Asocio aranĝis en Vroclavo kongreson de IFEF (Internacia Fervojista Esperantista Federacio). Al la jubilea 70a Internacia Kongreso de Fervojistoj Esperantistoj (IKEF), okazinta la 19-25an de majo en la ĉefurbo de Malsupra Silezio, aliĝis 121 partoprenantoj el 17 eŭropaj landoj, Ĉinio kaj Usono.

La kongreson aŭspiciis Societo por la Promocio de Turismo, Sporto kaj Kulturo “Kolejarz” (Fervojisto). Pollandaj Ŝtataj Fervojoj (PKP) senpage disponigis kongresan salonon en la Vroclava ĉefa stacidomo. La patronoj de la kongreso estis Koleje Dolnośląskie (loka trajnadministranto en Malsupra Silezio), Vroclava prezidento kaj la marŝalo de Malsupra Silezio. Ankaŭ la Vroclava Universitato kaj la Universitato de la Tria Aĝo apogis la kongreson.

La unua programero estis Interkona Vespero en la konferencejo de la hotelo *Piast*. La dimanĉan matenon okazis la malfermo en la Vroclava Universitato kun ĉeesto de reprezentantoj de regionaj kaj urbaj instancoj. Kiel honoraj gastoj partoprenis vicprezidanto de UEA Stefan McGill, prezidanto de la societo “Kolejarz” Ryszard Maslowski kaj Katarzyna Odrowska el la Malsupra-Sileziaj Fervojoj.



IFEK-70: Grupfoto en Vroclavo

La prezidantino de IFEF Rodica Todor malfermis la Kongreson kaj en sia parolado emfazis la gravecon de Esperanto-kulturo en la fervojista medio. Ŝi transdonis diplomojn al kelkaj meritaj membroj. La malfermon ornamis koncerto de la blinda muzikisto Carlsten Schanathorst (konata kiel Kaŝi), la antikvan orgenon ludis profesoro Adam Jezierski, rektoro de la Vroclava Universitato, kiu ankaŭ parolis en Esperanto. Dum la suna dimanĉa posttagmezo gastoj vizitis la malnovan urbocentron, la katedralon kaj aliajn vidindaĵojn de Vroclavo. Vespere en la kulturcentro *Impart* okazis la Nacia vespero – koncerto kun regionaj kantoj kaj dancoj.

Lunde matene kunvenis la komitato de IFEF, kaj posttagmeze okazis renkontiĝo de la faka kaj terminologia komisionoj. En la diskuto oni argumentis por la modifo de la fervojaj teknikaj terminoj. Vespere en la fervojista sesia salono okazis koncerto kaj prezentiĝo de venontjara kongreso de IFEF en Malago.

La mardan matenon en la konferencejo estis prezentitaj fakaj prelegoj. La ĉefan prelegon “Modernigo de la historia fervoja arkado en Gorzów Wielkopolski” prezentis Wiesław Libner – prezidanto de PEFA. Je 12h30 trajno de la lokaj fervojoj KD startis direkte al Jaworzyna Silezia, kie la kongresanoj vizitis la muzeon de Industrio kaj Fervojo kun malnova deponejo de vaporlokomotivoj kaj faris vojaĝon per antikva vagonaro en la tereno de la Muzeo. Poste la centpersona grupo iris trajne al Świdnica, kie ni aŭskultis interesajn rakontojn pri la historio de la fama Katedralo kaj spektis Templon de Paco, enskribitan en la Unesko-listo de Monda Heredaĵo.

Merkrede okazis la plenkunsido de IFEF. La estraro prezentis raportojn pri la lastjara agado, kaj la IFEF-komitatoj ĝin akceptis. Ili aprobis la financon bilancon por 2017 kaj buĝeton por la nuna jaro. IFEF elektis Malagon kiel la kongresurbon por majo 2019 kaj provizore akceptis la proponon okazigi la kongreson en 2020 en Ĉinio. Posttagmeze plejparto de la kongresanoj navigis sur la rivero Odro en la plej granda Pollanda turisma riverŝipo *Vratislavia*. Post la vespermanĝo oni aŭskultis koncerton de la populara ĉeĥa muzikbando *No Problem* kun kantoj en diversaj lingvoj ankaŭ en Esperanto.

Ĵaŭde okazis tuttaga ekskurso en la montaro Karkonosze kun valoj de palacoj kaj ĝardenoj, parko de la miniaturaj monumentoj el la regiono de Malsupra Silezio en la urbeto Kowary. Vespere okazis adiaŭa koncerto, en kiu kantis ankaŭ la konata kanzonisto JoMo. Post la koncerto, pro la frumatena foriro de gastoj el Hispanio, oni transdonis la kongresan flagon al la organizantoj de la 71a Kongreso en Malago. La prezidanto de IFEF resumis la rezulton de la kongresa laboro.

La 25a de majo estis tago de adiaŭo en la klubejo de Silezia Esperanto-Asocio. La Estraro de IFEF dum la ferma kunsido resumis la kongresajn laborojn.

Krom la menciitaj programeroj dum la kongreso de lundo ĝis vendredo funkciis baza kaj daŭriga kursoj de Esperanto. Atelierojn pri ĵurnalismo gvidis la redaktoro Albert Schubert el Germanio. Post la kongreso 18 partoprenantoj vojaĝis al Krakovo.

Wiesław Libner

Esperanto dum la Katolikaj Tagoj en Münster

Se granda evento kun plurdek mil vizitantoj okazas en urbo kun Esperanto-grupo, tiam tiu devas uzi la ŝancon. Tial la Esperanto-Societo de Münster (Germanio) jam de pli ol jaro preparis sian partoprenon en la Katolikaj Tagoj de la 9a ĝis la 13a de majo 2018. Des pli klare, ĉar la lokaj membroj Hedwig kaj Rudolf Fischer aktivis en la germanaj sekcioj de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE) kaj de Kristana Esperantista Ligo Internacia (KELI).

La esperantistoj partoprenis en la “eklezia mejlo”, t. e. granda kolekto de informtendoj por prezenti multspecajn projektojn kun rilato al la katolika eklezio. Al la lupreno por tia tendo de pli ol 600 eŭroj kontribuis Germana Esperanto-Asocio (GEA) per 200 eŭroj, ĉar la sekcioj de IKUE kaj KELI estas inter ties fakgrupoj. GEA ankaŭ helpis eldoni novan version de la faldfolio “Esperanto en la eklezioj” kaj produkti novan grandan rul-varbilon, kiu donas superrigardon pri la gramatiko de Esperanto.

Plie la organizantoj de la Katolikaj Tagoj akceptis la esperantistojn por oficiala programpunkto “Esperanto – paco bezonas interkompreniĝon”, kiun sekvis ĉirkaŭ 35 partoprenantoj. Amuzon kaŭzis la komuna kantado de kvar modernaj religiaj kantoj en Esperanto; akompanis ĝin la eklezia muzikisto Stefan Lepping. Li apartenis al la naŭ esperantistoj en Münster kaj ties ĉirkaŭo, kiuj helpis en la informado de pli ol 500 interesatoj, nombritaj laŭ la kvanto de disdonitaj faldfolioj. 16 personoj postlasis sian adreson por ricevi inviton al la sekvanta Esperanto-kurso en Münster. Fine la aktivuloj, inter ili ankaŭ samideanino el Litovio, estis tre kontentaj pri la reagoj el la publiko, precipe ankaŭ de filologoj kaj de junaj homoj.

Rudolf Fischer



Guido Brandenburg, estro de la loka Esperanto-grupo, entuziasmigas informpetanton, dum aliaj junaj “klientoj” jam atendas esti servataj. (Foto: Hedwig Fischer)

Trilanda kongreso en Zweibrücken

Bele internacia estis ĉi-jara Germana Esperanto-Kongreso, kiu okazis kiel Trilanda Kongreso komune kun la franca kaj luksemburgia asocioj. Venis ĉ. ducent partoprenantoj, el kiuj triono el Francio. Entute ĉeestis homoj el deko da landoj en la kongresa urbo Zweibrücken, kiu troviĝas oriente de Saarbrücken, je deko da kilometroj de Francio.

La ĉefa temo estis “Esperanto tutmonde ligita”. Chuck Smith prezentis en la kongresa plenkunsido la progreson de Esperanto en la interreto, al kiu li mem multe kontribuis kiel kunfondinto de la Esperanto-vikipedio, gvidanto de la Esperanto-teamo por Duolingo kaj laste kiel kunfondinto kaj teknika gvidanto de la saĝtelefona programo Amikumu. Chuck subtenas ankaŭ la kunvenadon de retaj Esperanto-lernantoj per la programo “Events” de Duolingo. Eŭropanoj verŝajne konstatos kun miro, ke tiel nuntempe en Usono plimultiĝas lokaj Esperanto-renkontiĝoj. La prezidanto de Eŭropa Esperanto-Unio, Seán Ó Riain, prezentis la agadon de tiu asocio ĉe Eŭropa Unio. Aparte oni elstarigas la helpon de Esperanto por la posta lernado de pliaj lingvoj (propedeŭtiko) kaj – kompreneble – la eblecojn de Esperanto rilate al la multlingveco de Eŭropo. Menciindas la ebla kontribuo de Esperanto al la formiĝo de eŭropa identeco de la civitanoj.

La probable, ke iu parolas Esperanton, kreskas kun la nombro de ceteraj lingvoj,



La Kompanoj kantas en Zweibrücken

kiujn tiu homo regas. Tio eble ŝajnas iom surpriza, ĉar ja parta celo de Esperanto estas redukti la lernolaboron necesan por fremdaj lingvoj. Tamen Esperanto ja ofertas specialaĵon: Ĝi estas multe pli rapide lernebla – kaj ĝi estas ellernebla ĝis multe pli alta nivelo ol aliaj lingvoj. Oni povas atingi kvazaŭ perfektan regadon de nia lingvo, kio tre malfacilas ĉe aliaj lingvoj. Dum la kongreso Chuck Smith kaj Charlotte Scherping Larsson raportis pri ilia agado en la rondo de multlingvuloj, aparte en la “Polyglot Gatherings”, kiun kunfondis Chuck. Kvankam tiuj renkontiĝoj ne aparte celas Esperanto-parolantojn kaj okazas en multaj lingvoj, Esperanto havas fortan pozicion tie. En enketoj kvarono de la partoprenantoj deklaris, ke ili pretas aŭskulti ankaŭ prelegojn en Esperanto. Imprese, kiom signife nia lingvo progresas tie.

Podian diskutadon kaj samtempan interretan elsendon pri “Esperanto kaj interreto” organizis dum unu vespero la teamo de kern.punkto.info, Johannes kaj Eva. En alia vespero regionaj muzik- kaj dancgrupoj pruvis la multkulturecon de la kongresurbo Zweibrücken. Poste prezentiĝis la muzika duopo *La Kompanoj* el Francio, ĉefe per kantoj de Jacques Brel en Esperanto. Impona estis ankaŭ la libro-oferto dum la kongreso, al kiu kontribuis libroservoj el pluraj landoj.

Krome okazis deko da pliaj prelegoj pri diversaj temoj, kaj estis ankaŭ ebleco esplori la germanan kaj francan ĉirkaŭaĵon de la kongresurbo. Kompreneble okazis laborkunsidoj kaj jarĉefkunvenoj de partoprenantaj asocioj kaj de fakaj rondoj, ekzemple de instruistoj, verduloj kaj “Eŭropo, Demokratio, Esperanto”.

La publika atento de la kongreso estis bela. La prezidanto de la altlernejo, en kies salonoj la kongreso okazis, persone ĉeestis en la malfermo, pluraj politikistoj sendis salutmesaĝojn, ankaŭ la urbestro de Bulonjo-ĉe-Mar, partnera urbo de Zweibrücken; same venis salutoj de Mark Fettes por UEA kaj de Margaret Zaleski-Zamenhof. Pri la kongreso en du elsendoj raportis la regiona televido. Krome la germana novaĵagentejo dpa pretigis artikolon, kiu kun ilustraĵoj plenigis preskaŭ paĝon en dudeko da gazetoj de la regiono Rejnlando-Palatinato; ankaŭ lokaj gazetoj kaj televido raportis.

Lu Wunsch-Rolshoven

Ĝi estas demonstra versio de la 65-paĝa julia *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

22.6. - 31.8.2018

Synagóga

v Liptovskom Mikuláši

Po - Ne: 10.00 - 18.00 h

Partner:



JAZYK

ESPERANTO

A

JEHO TVORCA



Ekspozicio pri Esperanto kaj Zamenhof en sinagogo

La 21an de junio en la sinagogo de Liptovský Mikuláš – ĉi-jara SES-urbo en la koro de Malaltaj Tatroj – estis solene malfermita ekspozicio “Jazyk esperanto a jeho tvorca” (La lingvo Esperanto kaj ties kreinto). Ĉi tiu ekspozicio kunigas tri ekspoziciojn, kiuj dum la du lastaj jaroj estis preparitaj de SKEF (Slovakia Esperanto-Federacio) kunlabore kun E@I (Edukado@Interreto) kaj aparte prezentitaj en diversaj urboj de Slovakio: du estas dediĉitaj al Zamenhof (“Zamenhof en la formo de komikso” kaj “Zamenhof – la kreinto de Esperanto”) kaj unu al Esperanto (“Esperanto... pli ol nur lingvo”). Nun en la sinagogo troviĝis sufiĉe da spaco por prezenti ĉiujn tri en la formo de vasta komuna ekspozicio.

Laŭ la direktoro de la urba muzeo Jaroslav Hric (al kiu apartenas ankaŭ la urba sinagogo), granda avantaĝo estas, ke la ekspozicio troveblas en la sinagogo dum la tuta somera sezono – ĝis la fino de aŭgusto. Tiel ĝin havos ŝancon vidi pli ol 3000 vizitantoj.

Dum SES ĝi estos je dispono ankaŭ por la esperantistoj, kiuj venos lerni la lingvon al la tutmonde plej granda Somera Esperanto-Studado. Bonŝance la tri ekspozicioj estas pretigitaj dulingve, en la slovakaj kaj Esperanto. Krome, dum la tuta tempo eblas en la sinagogo aĉeti kelkajn Esperanto-titolojn, ĉefe lernolibrojn de la lingvo, vortarojn kaj dulingvajn verkojn.

La organizantoj de la ekspozicio estas: SKEF kaj E@I. La subtenantoj kaj partneroj de la ekspozicio estas LEK (Liptova Esperanto-Klubo), la urbo Liptovský Mikuláš, TV Liptov, Centro de Ludoviko Zamenhof, kaj Pola instituto Bratislava.

Peter Baláž

Ĝi estas demonstra versio de la 65-paĝa julia *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

31 maj 2018 la urbeŝtraro de Massa (Italio) titolis urbocentran placon “Mario e Catina Dazzini esperantisti”; la placo estas proksima al la sidejo de la Nacia Biblioteko de Eo, kiu estis unu el multaj iniciatoj de la du mondkonataj samideanoj. (Bruĉjo Kasini)

9 jun 2018 la urbo Guardamar del Segura (prov. Alikanto, Hispanio) omaĝis la forstan inĝenieron kaj e-iston Ricardo Codorníu y Stárico per malfermo de ekspozicio pri li kaj per inaŭguro de Placeto Ricardo Codorníu Stárico kaj Rondvojo Esperanto. (*La Bitbul-teno*)

Grupo de 17 ĉinaj e-istoj 4-7 jun 2018 vizitis Nordan Koreion (Korean Popoldemokratian Respublikon) por diskonigi Eon; Seula E-Kulturcentro donacis dekon da bazaj lernolibroj de Eo pere de Zhang Wei, kiu estas organizanto de la vojaĝo. (SEK)

Delegito de la Ea PEN-Centro Giorgio Silfer partoprenis la jarkonferencon de la internacia PEN-Komitato pri tradukarto kaj lingvaj rajtoj, kiu okazis 21-23 jun en la biblioteko de Bielo (Svislando); Silfer i.a. moderigis la debaton pri la literatura tradukado en Eŭropo ĉe minoraj lingvoj kaj prezentis la Ean tradukliteraturon. (HeKo)

Ĉi-printempe en la Ŝtata Publika Biblioteko de Las Palmas de Gran Canaria funkciis ekspozicio pri Eo, organizita de la E-grupo de Gran Canaria kun 15 paneloj de HEF, 40 diverslingvaj lernolibroj *Esperanto per Rekta Metodo* de Stano Marĉek, aro da E-revuoj, diversstemaj DVD-oj kaj KD-oj en aŭ pri Eo kaj du grandaj vitroŝrankoj plenaj da libroj. (*La Bitbulteno*)

La vicprezidanto de TEJO, d-ro Francesco Maurelli anoncis, ke TEJO ricevos grandan administran subvencion dum tri jaroj fare de instanco en Eŭropa Unio; temas pri ĉ. 45 mil eŭroj, per kiuj eblos dungi tri plentempajn oficistojn jare anstataŭ unu kaj duono ĝis nun. (HeKo)

Dum unu semajno (7-14 jul 2018) en 32 lokaj radiostacioj de Hungario 11-sekunda reklamo de Eo estos aŭdigata 526-foje. (Landa Agado)

La Nacia Universitato de Neĉeesta Edukado de Hispanio (UNED) aprobis la aldonon de Eo al la listo de lingvoj instruataj en ĝia centro CUID (Centro Universitario de Idiomas Digital y a Distancia, Universitata Bitaj kaj Neĉeesta Lingvo-Centro). (*La Bitbulteno*)

12 maj en Zagrebo okazis jarkunveno de Kroata E-Ligo, kiu elektis la novan estraron; kiel prezidanto de KEL estis elektita Spomenka Ŝtimec, vicprezidantoj fariĝis Boris Di Costanzo (Rijeka), Judita Rey Hudeček (Zagrebo) kaj Davor Klobučar (Osijek). (*Kresko*)

Uzbekistana E-Asocio okazigis E-kurson, kiun gividis la prezidanto de UzEA Gafur Mirzo; la sessemajnan kurson finis 12 personoj. (Landa Agado)

Je 1 jul 2018 al la 103a UK de Eo en Lisbono aliĝis 1497 e-istoj el 75 landoj; plejmulte el Francio 242, Brazilo 126, Germanio 118, Japanio 92, Pollando 77, Hispanio 69, Koreio 50, Italio 43, Belgio 42, Usono 42, Britio 36, Ĉinio 36, Portugalio 35, Nederlando 34, Litovio 31, Ruslando 31, Hungario 30 (uea.org).

Tribuno



The poster is designed to look like a piece of aged, torn paper pinned to a dark blue background with four colorful pushpins (yellow, blue, green, and yellow). At the top center is the logo of the Esperanto Association of Romania, featuring a colorful geometric design and the text "Asocio Esperantista Romanio". Below this, the main title "ESPERANTO-TAGO" is written in large, bold, green, sans-serif capital letters. Underneath the title, the date "26.07.2018" is printed in a smaller, black, sans-serif font. The central part of the poster is decorated with four overlapping photographs showing groups of people at various Esperanto events, some holding flags. Below the photos, the phrase "Justa komunikado" is written in a black, sans-serif font. In the bottom left corner, there is a QR code. In the bottom right corner, there is a logo for "Ellernu Esperanton" which depicts a stylized head with a globe inside, and the text "Ellernu Esperanton: www.lernu.net". At the very bottom, there are two lines of small text: "Pri lingvoj: www.lingvo.info" and "Pri interreta komunikado: www.esperanto.net | www.uea.org".

Asocio Esperantista Romanio

ESPERANTO-TAGO

26.07.2018

Justa komunikado

Ellernu Esperanton:
www.lernu.net

Pri lingvoj: www.lingvo.info
Pri interreta komunikado: www.esperanto.net | www.uea.org

Laŭ Silfer “Dum la venontaj jaroj okazos ĝuste tio: estraro, komitato, aktivuloj prioritare okupiĝos pri la malgrandigo de la defcito, pri la sanigo de la bilanco, pri la bonigo de la strukturo, pri la ŝrumpo de la membraro. Tio ĉerpos la energiojn destinendajn al la statutaj celoj”. Ĉu la 26an de julio, je la naskiĝfesto de Esperanto ne estas pli indaj farendajoj?

UEA pri la Monda Tago por Kultura Diverseco



(GK UEA) Ĉiujare je la 21a de majo, la komunumo de Unuiĝintaj Nacioj festas la Mondan Tagon por Kultura Diverseco por Dialogo kaj Evoluigo. Tiu festado unue okazis en la jaro 2002, sekve de aprobo fare de la Ĝenerala Konferenco de Unesko, en novembro de la antaŭa jaro, de la Universala Deklaracio pri Kultura Diverseco.

Laŭ Artikolo 1 de la Deklaracio, “Tiu diverseco estas enkorpigita en la unikeco kaj plureco de la identoj de la grupoj kaj socioj kiuj konsistigas la homaron. Kiel fonto de interŝanĝo, novigo kaj kreemo, kultura diverseco estas same necesa al la homaro kiel estas biodiverseco al la naturo. En tiu senco, ĝi estas la komuna heredaĵo de la homaro kaj rekoninda kaj asertinda favore al la nuna kaj estontaj generacioj.”

Artikolo 5 siavice atentigas, ke “Kulturaj rajtoj estas integra parto de la homaj rajtoj, kiuj estas universalaj, nedivideblaj kaj interdependaj. La florado de krea diverseco neprigas la plenan realigon de kulturaj rajtoj... Sekve, ĉiuj homoj havas la rajton esprimi sin kaj krei kaj disvastigi siajn verkojn en la lingvo, kiun ili mem elektas, precipe en sia denaska lingvo; ĉiuj personoj rajtas al altkvalitaj edukado kaj trejnado kiuj plene respektas ilian kulturen identecon; kaj ĉiuj homoj rajtas partopreni kulturen vivon kiun ili mem elektas, kaj plenumi siajn proprajn kulturajn moŝojn, konforme al respekto al homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj.”

Universala Esperanto-Asocio subtenas la klopodojn de Unesko kaj de Unuiĝintaj Nacioj konservi kaj fortigi lingvan diversecon, kaj samtempe serĉi vojojn por transponti tiun diversecon apoge al la homaj rajtoj kaj daŭripova evoluigo. La Asocio subtenas la sentojn esprimatajn en Artikolo 6 de la Deklaracio: “Samtempe kun sekurigo de la libera fluo de ideoj per vortoj kaj bildoj, oni zorgu ke ĉiuj kulturoj povu esprimi sin kaj konatigi sin. Libereco de esprimo, komunikmedia pluralismo, multlingvismo, egala aliro al belarto kaj al scienca kaj teknika scio, inkluzive en cifereca formo, kaj la ebleco, ke ĉiuj kulturoj havu aliron al la iloj de esprimado kaj disvastigo, estas la garantiiloj de kultura diverseco.”

La Agadplano aprobata de la Ĝenerala Konferenco por realigo de la Deklaracio enhavas tri promesojn kiuj rilatas al lingvoj, nome:

1. Protekton de la lingva heredaĵo de la homaro kaj subtenado de esprimo, kreo kaj disvastigo en kiel eble plej granda nombro da lingvoj.

2. Instigon de lingva diverseco – samtempe respektante al la denaska lingvo – je ĉiuj niveloj de edukado, ĉie kie tio eblas, kaj kuraĝigon al lernado de pluraj lingvoj ekde la plej frua aĝo.

3. Antaŭenigon de lingva diverseco en kiberneto kaj kuraĝigon de universala aliro tra la tutmonda reto al ĉiuj informoj en la publika sfero.

Nia Asocio instigas siajn membrojn festi kaj apogi kulturen diversecon, kaj utiligi la Internacian Lingvon Esperanto kiel rimedon por engaĝiĝi kun la diversaj kulturoj

de la mondo en spirito de reciprokeco kaj respekto. Se la “dialogo” menciita en la titolo de la nuna Tago portu sian plenan signifon, devas nepre temi pri dudirekta komunikado kiel eble plej senpera kaj signifoplena.

La ĉi-jara festa mesaĝo pri la Tago de Audrey Azoulay, Ĝenerala Direktoro de Unesko, emfazas “la neceson protekti la diversajn formojn de kultura esprimiĝo – lingvojn, artojn, metiojn, vivstilojn – precipe tiujn de minoritataj popoloj, tiel ke ili ne forviŝiĝu fare de la normiga movado kiu akompanas tutmondiĝon”. Ŝi citas la vortojn de Mahatma Gandhi: “Mi ne deziras, ke mia domo estu murigita je ĉiuj flankoj, nek ke la fenestroj estu ŝtopitaj. Mi deziras, ke la kulturo de ĉiuj landoj estu disblovita tra mia domo kiel eble plej libere”. Pro tio, s-ino Azoulay sugestas, “kulturo ne estas heredaĵo ŝtone fiksita, sed heredaĵo vivanta kaj spiranta, malferma al influoj kaj dialogo, permesanta al ni adaptiĝi pli pace al la mondaj ŝanĝiĝoj”.

Ni gratulas Uneskon kaj Unuiĝintajn Naciojn pro iliaj klopodoj antaŭenigi kulturen diversecon, kaj tian daŭripovan evoluigon kiu konservas tiun diversecon, kaj promesas nian aktivan subtenon al tiuj klopodoj.

UEA alvokas okaze de la Monda Tago de Rifuĝintoj

(GK UEA) Unuiĝintaj Nacioj nomis la 20an de junio Monda Tago de Rifuĝintoj. Ĉitage ni aparte memoras la multajn milionojn da homoj forigitaj el siaj hejmoj pro milito, perforto kaj naturaj katastrofoj. Universala Esperanto-Asocio solidariĝas kun multaj aliaj organizaĵoj por atentigi pri la neceso de internacia kunlaboro por alfronti la bezonojn de rifuĝintoj kaj labori por ilia paca kaj sekura reiro al siaj originalaj loĝlokoj, aŭ ilia azilo en la landoj kie ili, senelekte kaj senkulpe, troviĝas.

Inter la multaj demandoj pli forte alfrontendaj estas la lingva problemo: multaj rifuĝintoj troviĝas en situacioj kie ili ne povas lingve komuniki kun la ĉirkaŭaj homoj, inkluzive de registaraj funkciuloj, instruistoj, medicinistoj kaj krizolaborantoj. Kiel parolantoj de la Internacia Lingvo Esperanto, ni estas aparte konsciaj pri tiu neatento al adekvata alfronto de lingvaj diferencoj.

Okaze de la Monda Tago de Rifuĝintoj 2018, ni alvokas al registaroj, neregistraj organizaĵoj, kaj tute aparte al Unuiĝintaj Nacioj mem, alfronti lingvajn demandojn pli rekte kaj en spirito de lingva justeco, nediskriminacio kaj humana kunsento.

La eldonanto kaj la redaktoro de *La Ondo de Esperanto* partoprenos la tradicion Someran Esperanto-Studadon

en Liptovský Mikuláš (Slovakio) la 14-22an de julio 2018

**Nia kontribuo al SES: Kurso pri historio de Esperanto (kvin lekcioj),
prezentado de *Nia Diligenta Kolegaro*, kvizo pri famaj esperantistoj kaj
renkontiĝo kun la legantoj de *La Ondo*.**

La Estraro planas altigi la kotizojn kaj likvidi la Jarlibron

Post la kunsido de la Estraro, okazinta la 20-22an de aprilo 2018 en Roterdamo la komitatanoj de UEA ricevis la dokumenton, el kiu ni citas ĉi-sube:

<...> Kiel atendite, la evoluo de la financoj en 2017 estis malbona. La kostoj (elspezoj) de la Asocio estis signife malpli ol buĝetite, ĉefe dank' al ŝparoj ĉe la Oficejo (€29.000) kaj ĉe Movada Evoluigo (€22.000) – la suma ŝparo estis pli ol €50.000. Tamen daŭris negativaj evoluoj ĉe la rimeda (enspeza) flanko. Kotizoj alportis €50.000 malpli ol buĝetite, kongreskotizoj €19.000 malpli, kaj rento pro diversaj investoj €40.000 malpli ol buĝetite. Krome la plano enspezi pli per ekstermovadaj subvencioj – unu el la ĉefaj iniciatoj de la antaŭa Ĝenerala Direktoro – estis sukcesa nur en rilato al la Volontula Domo, lasante truon de €90.000 ĉe la Rimedoj. El tiuj diversaj evoluoj (aŭ ne-evoluoj) rezultis defcito en 2017 de ĉ. €160.000.

<...> Realisme, ni devas antaŭvidi ke la rimeda flanko de la buĝeto ne multe pliboniĝos ene de unu jaro. La kongreso en 2019 (Lahtio) kredeble estos malpli granda ol en Lisbono; la enspezoj pro rento povus esti ankoraŭ pli malaltaj; kaj ni ne plu inkluzivos subvenciojn en la buĝeto de la Spezokonto, krom en la formo de lupagoj ĉe la Volontula Domo. Aldone, la Estraro jam decidis malaltigi la kompencon al la Spezokonto el la Rezervo Dumvivaj Membroj, kiu jam estas multe sub la bezonata nivelo por pagi la kostojn de tiuj membroj dum ilia atendebla vivodaŭro. Tial eĉ en plej bona kazo la buĝetaj rimedoj verŝajne restos sub la nivelo de 2017.

Unu klare necesa paŝo estas plialtigi la kotizojn. La laborgrupo pri financa resanigo jam diskutis kaj aprobis proponon de la Ĝenerala Direktoro, altigi la bazan kotizon je 10% por 2019. La laborgrupo tamen favoras pli ĝeneralan reformon de la kotiz-sistemo, pli-malpli laŭ la ideoj jam prilaboritaj de la Komitato, plej laste per Komitata Forumo en Seulo. La Estraro konsentis pretigi tian proponon kunlige kun la buĝeto 2019. Laŭ ĝi, malaperos la kategorio MG (Membro kun Gvidlibro); la kategorio MJ (Membro kun Jarlibro) fariĝos la baza kotiz-kategorio, kun nur retaj servoj; la kategorio MA restos pli-malpli senŝanĝa. La kotizo por baza membreco en Nederlando (la referenca kotizo), laŭ la ĝisnuna analizo, estos €44; la MA-kotizo €74. Tio signifas relative grandan plialtigon de la MJ-kotizo; kompanse, oni proponos rabatojn por TEJO-anoj (50% sub la aĝo 19, 25% inter 19 kaj 24) kaj donos la eblon de rabato ankaŭ al aliaj homoj kun limigitaj monrimedoj.<...>

Ĝi estas demonstra versio de la 65-paĝa julia *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Arkivo



La listo de la juliaj jubileoj kaj datrevenoj komenciĝas je la dekjara mortodatreveno de profesoro Lee Chong-Yeong, prezidanto de UEA (1995-98), kiun multaj konsideras la plej grava Azia esperantisto.

Jubileoj kaj memordatoj en julio 2018

4. Antaŭ 10 jaroj mortis **Lee Chong-Yeong** (1932-1948-2008), korea fakulo pri komerca administrado kaj esperantisto, prezidanto (1994-95, 1998-2001) de Korea Esperanto-Asocio, komitatano (1989-2007), prezidanto (1995-98) kaj vicprezidanto de UEA (2001-04), ano de ties Elekta Komisiono (2006-07), lanĉinto de “Kampanjo 2000”, kuniniciatinto de la unua Nitobe-simpozio en la 81a UK (Prago, 1996), reprezentanto de UEA en pluraj internaciaj konferencoj, aŭtoro de *Esperanto en la 21a jarcento* (2001) kaj de kelkaj aliaj libroj, honora membro de UEA (2004).

5. Antaŭ 125 jaroj naskiĝis **Ivan Vasiljeviĉ Lubjanovskij** (Лубяновский, 1893-1908-1972), ruslanda kaj sovetunia esperantisto, tradukinto de multaj poemoj de Puŝkin, Lermontov kaj aliaj (entute 48) rusaj poetoj, kiuj aperis en *Amikeco*, *La Suda Stelo*, *La Ondo de Esperanto*, *Norda Prismo* kaj en aliaj Esperanto-gazetoj, ankaŭ en formo de samizdataj fotolibretoj.

11. Antaŭ 30 jaroj mortis **Gaudenzio Pisoni** (1920-1959-1988), itala instruisto de literaturo, lernejestro kaj esperantisto, tradukinto el la itala (Leopardi, Lorenzo de' Medici, Ungaretti, Montale, Quasimodo k. a.), poeto kaj recenzanto, plurfoja premiito en la Belartaj Konkursoj de UEA, membro de la literatura rondo *La Patrolo*, kunlaboranto de *Literatura Foiro* kaj aliaj Esperanto-gazetoj.

15. Antaŭ 40 jaroj mortis **Lajos Tárkony** (1902-1919-1978), hungara financoficisto kaj esperantisto, konata en Esperanto ankaŭ kiel Ludoviko Totsche, aŭtoro de la poemaro *Soifo* (1964) kaj de la mejloŝtona kolekto *De paĝo al paĝo* (1932) pro kiu li estas konsiderata kiel la unua serioza literaturkritikisto en Esperanto, kunredaktoro de *Literatura Mondo* kaj kunlaboranto de *Hungara Vivo* kaj de la Esperanto-fako de la Hungara Radio, tradukinto de *Vojaĝo en Faremidon* de Frigyes Karinthy (1934).

19. Antaŭ 125 jaroj naskiĝis **Wanda Zamenhof** (denaske: Frenkel, 1893-1954), pollanda kuracistino, bofilino de Lazarj Markoviĉ Zamenhof (edzino de Adamo Zamenhof kaj patrino de Ludoviko Zamenhof-Zaleski), partopreninto de pluraj UKoj ekde la 4a UK (Dresdeno, 1908).


26. Antaŭ 131 jaroj en la presejo de Ĥaim Kelter (Varsovio) aperis la 42-paĝa broŝuro *Internacia lingvo. Antaŭparolo kaj plena lernolibro (por Rusoj)* de Lazarj Markoviĉ Zamenhof, kiu kaŝis sin sub la pseŭdonimo “D-ro Esperanto”; la aperdato de ĉi tiu broŝuro, konata kiel la **Unua Libro**, estas konsiderata kiel la naskiĝdato de Esperanto.

Kulturo



La biografia skizo pri Zamenhof, verkita de Aleksander Korĵenkov por ESF, post la angla, slovaka kaj itala tradukoj ĵus aperis ankaŭ en la portugala versio.

Aperis la portugala versio de la Zamenhofa biografio



Ĉar en nacilingvaj enciklopedioj kutime estas nur unufraza mencio pri “pola lingvisto Ludwik (aŭ Ludwig) Zamenhof, la aŭtoro de Esperanto”, ESF (Esperantic Studies Foundation) decidis eldoni modernan biografian skizon pri Zamenhof en kelkaj naciaj lingvoj.

Laŭ mendo de ESF ĝin verkis la Ruslanda ĵurnalisto Aleksander Korĵenkov surbaze de sia ampleksa verko *Homarano*, lanĉita en julio 2009 kadre de la 94a Universala Kongreso de Esperanto en Bjalistoko (la dua, korekta kaj ampleksigita eldono aperis en 2011).

A. Korĵenkov verkis sian skizon en Esperanto, kaj en majo 2010 aperis ĝia angla versio, tradukita kaj adaptita de Ian Richmond. Baldaŭ sekvis la slovaka kaj post kelkaj jaroj la itala eldonoj. En junio 2018, sojle de la 103a UK

en la ĉefurbo de Portugalio, aperis la portugala eldono, tradukita de Fernando Pita, profesoro el la Universitato de Rio-de-Ĵanejro. Same kiel la aliaj lingvaj versioj, ankaŭ la portugala enhavas aldonajn tekstojn pri Esperanto de Humphrey Tonkin, kaj fotojn, kiuj mankis en la originala teksto.

La ĉeĥa traduko baldaŭ aperos. Interesatoj pri pliaj versioj skribu al Geoffrey Greatrex (geoffrey.greatrex@esperantic.org), kiu kunordigas la projekton en ESF.

Jam aperis:

Korĵenkov, Aleksander. *Zamenhof: Biografia skizo / Antaŭparolo* de Halina Gorecka. – Kaliningrado: Sezonoj; Kaunas: LEA, 2010. – 64 p.; 600 ekz.

Aĉetebla ĉe UEA: <http://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=8460>

Korzhenkov, Aleksander. *Zamenhof: The life, works and ideas of the autor of Esperanto / Translation and notes* Ian M. Richmond; Edited by Humphrey Tonkin. – New York: Mondial, 2010. – 100 p, il.

Aĉetebla ĉe UEA: <http://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=8437>

Korĵenkov, Alexander. *Život Zamenhofa: Život, dielo a myšlienky autora esperanta / Slovenský preklad z esperanta a angličtiny* Pavol Petrík; Úvod Peter Baláž, Humphrey Tonkin. – Partizánske: Espero, 2011. – 104 p., il.; 500 ekz.

Aĉetebla ĉe UEA: <http://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=9375>

Korzhenkov, Aleksander. *La vita di Zamenhof / Traduzione* Cristina de Giorgio; Prefazione di Giorgio Novello. – Alghero: Edizioni Nemapress, 2017. – 140 p., il.


Korĵenkov, Alexander. *Zamenhof: Vida, obra i ideias do autor do Esperanto / Tradução e notas* Fernando Pita. – Porto Velho: Temática Editora, 2018. – 196 p., il.

Halina Gorecka
Aleksander Korĵenkov

Zamenhofoj en Varsovio

Dobrzyński, Roman. *Zamenhof en Varsovio*. – Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 2017. – 160 p., il.

La plej konata esperantisto Zamenhof naskiĝis en Bjalistoko, tiam tute ne pola urbo, sed 44 jarojn el siaj 58 vivojaroj li pasigis en Varsovio, la ĉefa urbo de Pollando (laŭ la tiama statuso – nur la ĉefurbo de Varsovia gubernio en Ruslanda Imperio). Lia naskiĝurbo Bjalistoko situis en iama limregiono de la Granda Litova Duklando (do, en la historia Litovio). Zamenhoftempe ĝi estis Grodna gubernio de Ruslanda Imperio, kiu nur en 1921 oficiale eniris la teritorion de Pola Respubliko laŭ la Riga packontrakto. La Varsoviaj vivojaroj de Zamenhof estis liaj plej agoriĉaj kaj gravaj por la komenca periodo de tutmonda Esperanto-movado. Tutnature, la 160-paĝa eseo *Zamenhof en Varsovio* logos la atenton de ĉiu esperantisto, deziranta ekscii pli multe pri la vivo de la Kreinto.



Zamenhof en Varsovio estas la verko de mia samaĝulo, elstara esperantisto, profesia pola ĵurnalisto, reĝisoro de dokumentaj filmoj de Pola Televido Roman Dobrzyński. La atenton de internacia leganto li vekis, publikiginte en 2003 la libron *La Zamenhof-strato* (interparoladoj kun la nepo de Zamenhof, L. K. Zaleski-Zamenhof), kiu aperis ankaŭ en 15 naciaj lingvoj. Nun ni kun scivolo komencas legi la novan libron de R. Dobrzyński pri Zamenhof.

Jam ĉe eklego ni atentis, ke la aŭtoro rakontas al ni pri Ludoviko Zamenhof (p. 3 kaj 5). Kial ne pri Lazaro Zamenhof? Estas impresoj, ke la verko aperis surbaze de ĉiĉeronaj rakontoj por polaj ekskursoj tra la esperantista/juda Varsovio. Ni scias pri la pola tradicio Lazaron nomi Ludoviko, tamen, la libron *Zamenhof en Varsovio* Roman Dobrzyński nun prezentas al internacia legantaro!

La oficiala, do aŭtenta nomo de la majstro Zamenhof oficiale figuris kiel Lazaro Markoviĉ (patronomo) Zamenhof (ruse: Лазарь Маркович Заменгоф): en la registrolibro de la Bjalistoka rabenejo (1859), en la gimnazia atesto (1879), en la diplomo de la Varsovia universitato (1885), en la rabeneja registro pri la naskiĝo de la filino Sofio (1889, Kaŭno), en censo de Grodna loĝantaro (1897). Ankaŭ en la registrolibro de la 1a UK (1905, Boulogne-sur-Mer, Francio) – Zamenhof Lazar! La nomo Ludoviko estas la kromnomo de Lazaro Zamenhof, influita de la pola medio. Sur lia surtombo monumento estas kompromise skribite: “Doktoro Lazaro Ludoviko Zamenhof”. Sekve, la kreinto de Esperanto estas prezentenda aŭ nur per la antaŭnomo aŭtenta – Lazaro (Zamenhof) aŭ dunome – Lazaro Ludoviko, sed neniel sole Ludoviko (Zamenhof).

Malgraŭ la promesdona titolo (*Zamenhof en Varsovio*) nur 60% de la teksto rekte rilatas al Lazaro Zamenhof aŭ/kaj Esperanto. La aŭtoro celis gvidi la legantaron tra Zamenhofaj lokoj de Varsovio. La rakontado similas al tiu de urba ĉiĉerono, kiu al sia turista

grupo prezentas ĉefe nur ĝeneralajn informojn pri tiu aŭ alia objekto, tiu aŭ alia persono. Estas la gvidlibro tra Muranovo – la juda urboparto de Varsovio kaj la apuda juda tombejo (“forfalas” parolo pri la Varsovia Universitato, eĉ ne fota, kiu restas sur ekstera teritorio). Cetero temas pri Varsoviaj judoj ĝenerale, ekzemple, kiel ili setlis Varsovion, pri tradicioj, klerigaj reformoj. Vere, interesa estas la mallonga ĉapitreto (p.13) pri la german-sonaj nomoj de judoj. La 11-paĝa ĉapitro “Juda tombejo en Varsovio” estas utila ĝeneralsence, sed ne pro pli profunda konatiĝo kun Zamenhofoj kaj tial sendamaĝe povus esti mallongigita. Tute nekomprenebla estas la enlibro de la ĉapitro “Polin”, la Muzeo pri Historio de Polaj Judoj. Ja ĉi-ĉapitre ne enestas eĉ unu frazo pri Lazaro Zamenhof kaj Esperanto. Ĉu vere la muzeo ignoris tiujn? Figuras nur la sola “ligo” – “la ĉefa enirejo troviĝas flanke de Zamenhof-strato”.

Specialan valoron por la legantoj havas la 26-paĝa ĉapitro “Tomboj de Zamenhof-familianoj”. La aŭtoro dediĉas decan atenton al la forpaso de Zamenhofoj. Trafe kaj sufiĉe profunde estas prezentitaj la edzino Klara Zamenhof, la frato Felikso Fabjan Zamenhof. Multaj eŭropanoj vizitas la Varsovian, la plej grandan en Eŭropo, judan tombejon. Indus aldoni, ke por tiuj vizitantoj, kiuj ne havas ĉi tie sepultitajn proksimumojn, la vizitado estas pagata!

Cetere, pri kelkaj Zamenhofaj parenkaranoj temas ankoraŭ en du pliaj ĉapitroj, ekzemple, pri la filinoj Sofia kaj Lidia. Sofio estis la unua filino de Lazaro Zamenhof. Kaj jen, sur la paĝoj 35, 73, 74 123, 124 ŝi figuras kiel Sofio, sed sur paĝoj 97, 100, 101, 102, 127 la sama filino figuras jam kiel Zofia, laŭ la pola nomformo. Mi suspektas, ke la libro *Zamenhof en Varsovio* estis verkita originale ne en Esperanto kaj estis ne sufiĉe diligente tradukita el la pola malneto...

L. Zamenhof havis tri fratinojn: Fani, Aŭgusta kaj Ida. R. Dobrzyński rakontas nur pri la varsovianino Aŭgusta Hermelin (kiu pri Esperanto ne okupiĝis). Eĉ unufraze ne estas menciita Fani Pikover (naskita Zamenhof), kiu invitis la fraton post la fino de la unuversitato veni al la litova urbeto Vejsejo (litove: Veisiejai). Onidire, la fratino Fani al Esperanto rilatis skeptike, sed, laŭ la atesto de Edward Wiesenfeld (intima amiko de la Zamenhof-familio) en *Heroldo de Esperanto* (1925, №23/251): “Nun ŝi havas tri infanojn, kiuj scias kaj iom okupiĝas pri Esperanto”. En 1923 la filino Anna partoprenis en la Nurenberga UK kaj en 1926 ŝi loĝis samadrese kun Feliks Fabjan Zamenhof (Kościeliska 31).

En la ĉapitro „Dilemo” (pĝ. 16) la aŭtoro mencias la gravan judan grupon “litvakoj” sen prezenti la ĝustan sencon de tiu genta kategorio. Litvakoj ja ne estis “veraj” Varsoviaj judoj, ili estis “enmigrintoj” kaj tial ne ĉiam bonvole traktitaj de siaj polaj samgentanoj. Litvakoj estas judoj, kiuj naskiĝis kaj vivis sur la teritorio de la iama Litova Grandduka

Ĝi estas demonstra versio de la 65-paĝa julia *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Bibliografio de Aleksander Korĵenkov (3)

En la tria parto de la bibliografio de Aleksander Korĵenkov estas listigitaj liaj verkoj aperintaj en Ekzakte (en 1982-83 Informletero de Uralaj Esperantistoj), Sezonoj, Ruslanda Esperantisto kaj Spektro – Sovetuniaj kaj Ruslandaj Esperanto-gazetoj, en kies redaktado kaj eldonado li patroprenis.

Informletero de Uralaj Esperantistoj (ILdUE) / Ekzakte

1982

URA-4 // ILdUE, 1982, №2.

VEU-servo // ILdUE, 1982, №2.

1983

Lazura Tajgo - 7 // ILdUE, 1983, №4.

“Urala VEU-servo liveras...” // ILdUE, 1983, №5.

La interlingvistika URA-5 // ILdUE, 1983, №6.

Urala VEU-servo // ILdUE, 1983, №6.

1a Urala Kultura Forumo // ILdUE, 1983, №7.

Seminario de JK de ASE // ILdUE, 1983, №8.

Noto de la redaktoro // ILdUE, 1983, №8.

REVU-24 // ILdUE, 1983, №9.

Rezulto de la socialisma konkurado inter la Uralaj Esperanto-kluboj en 1982/1983 // ILdUE, 1983, №9.

Rendevuo de E.R. Kulturo // ILdUE, 1983, №9.

Noto de la redaktoro // ILdUE, 1983, №9.

1984

“Decembre jam definitive formiĝis la nova redakcio...” // Ekzakte, 1984, №1.

Literatura semajnfino en Sverdlovsk // Ekzakte, 1984, №1.

Tra la Esperanta gazetaro // Ekzakte, 1984, №1.

URA-6 // Ekzakte, 1984, №2.

Urala VEU-servo reaktivigās // Ekzakte, 1984, №2.

[И стал разведчиком] // Ekzakte, 1984, №2. – [Esperantisteco de N. Kuznecov en nova libro].

Uralanoj en E-ta gazetaro // Ekzakte, 1984, №2.

Redaktoraj notoj // Ekzakte, 1984, №2.

Planlingvoj en Uralo – por dua fojo // Ekzakte, 1984, №3.

Tjumena Literatura Semajnfino // Ekzakte, 1984, №3.

Je la tago de libro // Ekzakte, 1984, №4. – [Literatura Semajnfino en Sverdlovsk, decembro 1984].

Vizito // Ekzakte, 1984, №4. – [V. Opletajev en Tjumeno].

Belaj “Sezonoj” // Ekzakte, 1984, №4. – [La unua kajero de “Sezonoj”].

Denove pri la tradukado // Ekzakte, 1984, №4. – [3a Literatura semajnfino en Jalutorovsk, septembro 1984].

Urala VEU-servo // Ekzakte, 1984, №4.

Urala Libro-Servo // Ekzakte, 1984, №4. – [Prezento de la studo de A. Birjulin “Pri la nocio ‘esperantisto-akviulo’...”].

1985

Novjare en Jalutorovsk // Ekzakte, 1985, №1.

La 3-a konferenco pri planlingvoj // Ekzakte, 1985, №2.

Post 30-monata silento // Ekzakte, 1985, №2. – [OSER-38 en Novosibirsk].

Revuo de l’ planlingva revuo (“Planlingvistiko” – 1984) // Ekzakte, 1985, №2.

Denove en Sverdlovsk // Ekzakte, 1985, №3. – [3a Orientsovetia Kultura Forumo].

Faru vian elekton, ne maltrafu! // Ekzakte, 1985, №4. – [Okazontaj E-renkontiĝoj].

Kiom da en la mondo // Ekzakte, 1985, №4. – [Membrostatistiko de UEA].

La Tagila leciono // Ekzakte, 1985, №5. – [URA-8 en Niĵnij Tagil].

4a Urala konferenco pri planlingvistiko // Ekzakte, 1985, №5.

Kiomas la SATanoj? // Ekzakte, 1985, №5.

1986

La kvara Semajno // Ekzakte, 1986, №1.

Ree en Permo // Ekzakte, 1986, №2. – [4a Urala konferenco pri planlingvistiko].

La pokalo Fayne ĉe UFE // Ekzakte, 1986, №2.

La kvara – multfara // Ekzakte, 1986, №4. – [4a Esperanta Semajno en Sverdlovsk].

Kompetenta revuo // Ekzakte, 1986, №4. – [Prezento de “der esperantist”].

Agrablaj semajnfinoj // Ekzakte, 1986, №5. – [SPERTO-86 apud Ŝalja, renkontiĝo en Jalutorovsk]

Aleksej Birjulin – la plej sukcesa // Ekzakte, 1986, №5. – [La plej populara verko en Sezonoj 1984/85].

Akcepto ĉe Sledopyt // Ekzakte, 1986, №6.

Sciencfiksis kaj planlingvoj // Ekzakte, 1986, №6.

1987

Ankoraŭfoje pri omo // Ekzakte, 1987, №1.

Pli ol 400, kaj en la nova lokalo // Ekzakte, 1987, №1. – [KEB en propra ejo].

“Komencanto” por komencanto // Ekzakte, 1987, №2. – [Komencanto-87].

En la urbo de antikvo // Ekzakte, 1987, №3. – [UER-10 en Tobolsk].

Ĝi estas demonstra versio de la 65-paĝa julia *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Mozaiko

#IJK2018



4–11 AŬGUSTO

BADAJOS _ HISPANIO



Spritaj splitoj kaj preskeraroj

El la kolekto de reduktoro

Bertilo konfuza kaj superflua

Bertilo Wennergren: La elturniĝo povas esti plena forigo de alineo aŭ sekcieto, kiu nun impresas min kiel nure konfuzan aŭ superfluan. (<http://www.liberafolio.org/2018/05/09/pomego-proksimigadas-al-papera-reapero>, stato 26 jun 2018)

Por iĝi slavo, utilas libera peniskapo

... cirkumcido estas por religioj simbola kastro por slavigi kredantojn... (Robert Molimard: Pripensoj pri cirkumcido kaj klitorektomio // *La Kancerkliniko*, 2018, N^o166, p. 5, rimarkis Ionel Oneț)

Por kio sufiĉas pepoj

... Eugent Bushpepa... prezentiĝis en la Eŭrovido-Kantokonkurso 2018, kaj atingis... dek-unuan lokon. (Tri albanoj kantokonkursis // *Monato*, 2018, N^o7, p. 12)

Akordo misagorda

Trump... ĵus nuligis la nuklean akordon, kiun sukcesis relaloigi Obama. (Ĵak Le Puil: La Kuracoservo // *La Kancerkliniko*, 2018, N^o166, p. 4)

Ducent malinduloj

...neniu el tiuj, kies biografiojn ni en la libro trovas, ne estas iel "malinda". (Recenzo de Nikolao Gudskov pri "Nia diligenta kolegaro: Biografioj de 200 eminentaj esperantistoj" // *Esperanto*, 2018, N^o6, p. 129)

Balta perspektivo

La estoneco de nia movado estas la junuloj, tio estas kliŝa sed ja veras. (Robert Nielsen: Kiel junigi la movadon? <http://www.liberafolio.org/2018/05/28/kiel-junigi-la-movadon>, stato 28 maj 2018)

Toute routine

Vladimir Poutine reelektita prezidanto de Rusio por ses novaj jaroj... (Ĵak Le Puil: La Kuracoservo // *La Kancerkliniko*, 2018, N^o166, p. 4)

Agoniaj jaroj

Josep Grau Casas, kataluno, elektroteknikisto... mortis inter 1939 kaj 1942. (https://eo.wikipedia.org/wiki/Josep_Grau_Casas, stato 26 jun 2018; rimarkis Ionel Oneț)

Eta lingvocado

Instrui nur anglalingve en itala universitato "ekstermetus plene kaj senjuĝe la oficialan lingvon de la Respubliko el la akademia studado de tutaj fakoj"... (La angla malpermesata kiel ekskluziva instrulingvo, HeKo 681 3-A, 6 jun 2018, <http://www.esperantio.net/index.php?id=3536>)

Plukis István Ertl

Se en via lando estas peranto de *La Ondo de Esperanto*, pagu al tiu en via landa valuto. Ni havas perantojn en pluraj landoj. Vidu la liston de la perantoj ĉi-sube.

Se vi havas konton ĉe UEA, sendu ĝirilon por 15 eŭroj al la Centra Oficejo de UEA (Roterdamo), kopie al nia redakcia adreso rete (sezonoj@kanet.ru) aŭ poŝte (RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando – Россия). Nia UEA-konto “avko-u”.

Vi povas uzi la internacian monpagan sistemon PayPal, vidu pli en <http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Ruslandanoj pagu 750 rublojn al Галина Романовна Горецкая poŝte (RU-236039, Калининград, аб. ящик 1205), banke (petu informojn pri la kontonumero). Ni akceptas pagojn ankaŭ per Яндекс.Деньги (konto 4100138523456, informu retpoŝte pri la pagonumero), vidu pli en <http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>.

Perantoj de *La Ondo de Esperanto*

Argentino: Roberto Sartor, Saenz Peña 3912, B° La Capilla — 52, CP 5507 — Vistalba, Luján de Cuyo Mendoza. Rete: rosar@fibertel.com.ar.

Aŭstralio: Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson St., Redfern N.S.W. 2016. Rete: libroservo@ans.com.au.

Aŭstrio: Leopold Patek, Martinstr. 104/38, AT-3400 Klosterneuburg. Rete: aon.913548977@aon.at.

Belgio: Flandra Esperanto-Ligo, Lange Beeldekensstraat 169, BE-2060 Antwerpen. Rete: retbutiko@fel.esperanto.be.

Brazilo: Brazila Esperanto-Ligo, SDS Ed. Venâncio III Sala 303, BR-70393-902 Brasília-DF. Rete: bel@esperanto.org.br.

Britio: EAB/Viv O'Dunne, Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE. Rete: eab@esperanto.org.uk

Bulgario: Georgi Mihalkov, «Nadeŝda» V, bl. 529, vh A et 9 ap 33, BG-1229 Sofia. Rete: modest@abv.bg.

Ĉeĥio: Pavel Polnický, Lidická 939/11, CZ-29001 Poděbrady III. Rete: Cea.polnicky@quick.cz.

Ĉinio: Trezoro Huang Yinbao, Esperanto-Centro, Jinqiao Touzi Gongsi, Jingchuan-Xian Nonglin-lu, Pingliang Gansu, CN-744300. Rete: agrikulturo@126.com.

Danlando: Arne Casper, Bryggervangen 70, 4, tv. DK-2100 København Ø. Rete: arne-casper@email.dk.

Estonio: Ahto Siimson, Kastani väikekoht 12-11, Paikuse, Pärnu maakond, EE-86602. Rete: ahto.siimson@esperanto.ee.

Finnlando: EAF / Paula Niinikorpi, Siltasaarekatu 15 C 65, FI-00530, Helsinki. Rete: paula.niinikorpi@gmail.com.

Francio: Espéranto-France, 4 bis rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris. Rete: info@esperanto-france.org.

Germanio: Wolfgang Schwanzner, Pfarrer-Seeger-Strasse 9, DE-55129 Mainz. Rete: libroj@esperanto-buecher.de.

Hispanio: Pedro A. Garrote, C/Las Mercedes, 5-5°-C ES-47006 Valladolid. Rete: hiperanto.uea@terra.com.

Hungario: Esperanto-Centro Eventoj, Leiningen u. 4, HU-1193 Budapest. Rete: szilvasi@eszperanto.hu.

Hungario: Hungaria Esperanto-Asocio, HU-1146 Budapest, Thököly út 58-60. Rete: hungario@gmail.com.

Irlando: Joy Davies, 9 Templeogue Wood, Dublin 6W. Rete: noviresp@eircom.net.

Islando: Islanda Esperanto-Asocio, p. k. 1081, IS-121 Reykjavík. Rete: esperant@ismennt.is.

Italio: Itala Esperanto-Federacio, Via Villoresi 38, IT-20143 Milano. Rete: f-esp-it@libero.it.

Japanio: Japana Esperanto-Instituto, Sinzyuku-ku Waseda-mati 12-3, Tōkyō-to 162-0042. Rete: esperanto@jei.or.jp.

Katalunio: Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008 E-08204 Sabadell, Katalunio. Rete: v.sole@esperanto.cat.

Koreio: KEA, 1601 Kang Byeon Hanshin Core, 350 Mapo-dong, Mapo-ku, Seoul-121-703. Rete: kea@esperanto.or.kr.

Kroatio: Marija Belošević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb. Rete: mbelosev@public.carnet.hr.

Latvio: Margarita Želve, Rūpniecības 35-13, LV-1045 Rīga. Rete: margarita.zelve@gmail.com.

Litovio: Litova Esperanto-Asocio, p. k 167, LT-3000 Kaunas-C. Rete: litova.ea@mail.lt.

Meksiko: Mallely y/o Magdalena Martínez Mateos Av. 523, No.187, 1a Sección de San Juan de Aragón, Del. Gustavo A. Madero, México D.F., CP 07969, México. Rete: ondo@esperanto-mexico.org.

Nederlando: Univerala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam. Rete: ionel@co.uea.org.

Norvegio: Anne Karin Bondhus, Morenefarefaret 8 A, NO-4340 Bryne. Rete: akbondhus@jkn.no.

Nov-Zelando: G. David Dewar, PO Box 35849, Browns Bay, Auckland NZ-0753. Rete: gddewar@ihug.co.nz.

Pollando: Pola Esperanto-Asocio, ul. Andersa 37/59a, PL-00-159 Warszawa. Rete: sekretario@esperanto.pl.

Ruslando: Галина Романовна Горецкая, 236039, Калининград, аб. ящик 1205. Rete: sezonoj@kanet.ru.

Serbio: Miomirka Kovačević, Španskih boraca 32, RS-11070 Novi Beograd. Rete: miomirka.kovacevic@gmail.com.

Slovakio: Stano Marček, Zvolenská 15, SK-03601 Martin. Rete: revuo@stonline.sk.

Svedio: Leif Holmlund, Kågevägen 40 B, SE-931 38 Skellefteå. Rete: leif.holmlund@telia.com.

Svislando: Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen. Rete: ch_scheidegger@bluewin.ch.

Usono: Esperanto-USA, P.O.Box 1129, El Cerrito CA 94530. Rete: elna@esperanto-usa.org.

Neniam sendu monon en kovertoj!

**30-a Internacia
Esperanto-Konferenco**



Temo:

ESPERANTO EN ARTOJ

**21-a ĝis 27-a julio 2018
en kastelo Grésillon (Francio)**



**Riĉaj prelega, kultura
kaj turisma programoj**

**Pliaj informoj kaj aliĝiloj ĉe:
osiek.org/iek**



LIPTOVSKÝ MIKULÁŠ (SK) 14 - 22 JULIO 2018

Venu sperti la plej mojosan someran Esperanto-lernejon!

Somera Esperanto-Studado (SES) estas semajna somera internacia lernejo de Esperanto por kaj komencantoj kaj progresintoj kun riĉa distra programo.

► Por informoj kaj aliĝo vizitu: <http://ses.ikso.net>



103-a Universala Kongreso de Esperanto

Lisbono, 28 julio - 4 aŭgusto 2018

